

Johann Wolfgang von Goethe,  
Rozeto en herbejo

*tradukita de Gotthilf Sellin*

Knab' rozeton vidis li,  
Vidis en herbejo;  
Estis juna, bela ĝi,  
Por ĝin vidi kuris li,  
Vidis kun ĝojego.  
Roz', rozeto, ruĝa roz',  
Rozo en herbejo.

Diris knab': mi rompos vin,  
Rozon en herbejo,  
Diris roz': mi pikos vin,  
Ĉiam vi memoros min,  
Mi ne ĝin permesos.  
Roz', rozeto, ruĝa roz',  
Rozo en herbejo.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin,  
Rozon en herbejo;  
Kvankam roz' defendis sin,  
En koler' ĝi pikis lin,  
Tamen morti devis.  
Roz', rozeto, ruĝa roz',  
Rozo en herbejo.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Knab' rozeton vidis li

*tradukita de Joachim Gießner*

Knab' rozeton vidis li;  
erikeja floro.  
Juna, bela estis ĝi.  
Por admir'i kuris li  
ĝoje kun adoro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,  
vi rozeta floro“.  
Diris roz': „Mi pikos vin,  
ke vi ne forgesos min,  
premas min doloro.“  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin;  
erikeja floro.  
Rozo ja defendis sin  
kaj sufere pikis lin,  
ne utilis ploro.  
Rozo, rozo, ruĝa roz',  
erikeja floro.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
La rozeto

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Knabo vidis – jen rozeto  
Sur la kampo staras;  
Bela, juna la floreto . . .  
Vive kuras la knabeto,  
Ĝojas, miras, flaras.  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros  
Belulinon mian »;  
Floro diris : « vi foriros, –  
Per pikiloj mi disŝiros  
Tuj la manon vian ».  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante  
La rozeton prenis, –  
La floreto batalante  
Sin defendis pikadante,  
Sed la sorto venis.  
Sur la kampo la rozet'  
Kiel infanet'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (\*1844-05-18 – †1921-10-09).*

*Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en [http://kantaro.ikso.net/rozeto\\_en\\_herbejo](http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo). Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf\\_Sellin](http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin).*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)*

*Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*